

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

N-ro 9 * 27. Nov. 1920

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

La Granda Horo. ★ For la Batalilojn!

Disigo de Praktiko kaj Teorio — la bazo por reunuigo de ĉiuj mondlingvanoj kaj komuna agado al la sama komuna celo.

La Granda Horo ekestas.

En Bruselo oni elparolis la gravan vorton, kiu montras al ni la solan vojon, sur kiu ni povas atingi nian celon:

Ĉiu, kiu konfesas la necescon de internacia helplingvo, aliĝu al la movado Esperantista por realigi tiun grandan progreson, prokrastante ĉian plibonigon ĝis la tempo, kiam la internacia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj, t. s. kiam Esperanto estos ĝenerale enkondukita!

Ni konas tre bone la mankojn de Esperanto. Neniu prudenta Esperantisto pretendas, ke la lingvo de li propagandata estis perfekta. Oni rajtas supozu, ke ĉe multe pli bona solvo estas ebla.

Cu Ido aŭ Esperantida estas tia pli bona solvo, mi ne volas esplori ĉi tie. La demando estas hodiaŭ, ĉu ni rajtas jam nun anstataŭi Esp. per nova pli bona lingvo.

Tiuj ĉi demandoj mi devas nepre nei. Eĉ se la nova lingvo estus tiel ĝenie konstruita, ke ĝi debole superus la nunajn sistemojn, ni ne rajtus pro tio forlasi Esp. antaŭ la realigo de la Ideo mem. Ĉar ni devus rekomenchi tute denove kaj ĵetus eble 50 aŭ 100 jarojn returnen la mondlingvan movadon. Kvankam en nuntempo relative nur malmultaj homoj okupiĝas serioze pri Esp., ĝi tamen estas nun fakte rigardata kiel la internacia lingvo. Forlasante Esp. kaj proponante al la mondo tute novan L. I., ni malhavigus al nia movado ĉiun fidon, kaj la mondo — almenaŭ la nun vivanta generacio —, kredante sin duan fojon perfidita kiel siatempe per Volapük, tute ne plu okupiĝus pri nia afero. Ni ne povas preterlasi la fakton, ke la mondo nun kutimiĝis al Esp., same kiel ĝi jam unufoje kutimiĝis al Volapük.

Ni nepre devas meti — almenaŭ en la estante — la ideon super la formon. La plej perfekta formo ne utilis al ni, se pro ĝi la ideo mem malsukcesus.

Ekzistas do por ĉiuj seriozaj, konsciaj mondlingvanoj nur unu vojo irebla, montrita de la Brusela Kongreso: fidele resti, resp. aliĝi, al la Fundamento de d-ro Zamenhof, kaj batali en la praktiko jam nur por Esperanto, prokrastante ĉiujn reformojn ĝis post la ĝenerala enkondukiĝo de la ideo mem. Sed, konsciante, ke Esp. ne povos resti por eterne la L. I., ni tamen rajtas jam nun en la teorio diskuti pri la eblaj reform-sistemoj, kiuj estas multaj, kaj elektii aŭ eventuale nove krei tiun lingvon, kiu estos efektive en ĉio supera al la naturaj lingvoj, supera eĉ al Esperanto, Ido kaj Esperantida — la mondlingvon de l' estonteco!

Sed por atingi tiun plej belan, plej kompletan, plej eble perfektan estontan mondlingvon, ja ne sufiĉas unu persono nek akademies de kelkaj scienculoj, por tio estas necesa la kunlaborado, eble dum jardekoj, de ĉiuj interesuloj (scienculoj, teknikuloj kaj poetoj) — unuavice — verkistoj kaj poetoj. Oni ne povas preni lingvon el la aero, kion ŝajnas opiniu multaj el niaj nunaj reformuloj. Jam la kreado de Esperanto per unu ĝenuilo bezonis multajn jarojn; la kreado de la estonta mondlingvo per multaj personoj bezonos neantaŭvideble longan tempon.

Do mi konsilas al ĉiuj vi, miaj karaj kunbatalantoj:

Esperantistoj, restu en la praktiko fidelaj al la bona Fundamento, kiun starigis nia ĝenia Majstro, ĝis kiam la triumfo estos certigita por la ideo mem!

Idistoj, lasu vian senfruktan agadon por dua L. I.; vi atingos nenion, ĉar la Esperantistoj estas firme decidintaj ne forlasi la Fundamento antaŭ la certigo de la venko; vi do nur prokrastas la finvenkon de nia komuna ideo. Sekvu la ekzemplon de via samlingvano en la Brusela Kongreso, kiu — pro la bono de la internacilingva afero — ankaŭ aliĝis al la deziresprimo de la kongreso, por ne pli malhelpi la rapidan solvon de la akcepto de L. I., tamen konservante sian privatan preferon por Ido.

Esperantistoj, ne provu feliĉigi la mondon per tria internacia lingvo; sufiĉu ankaŭ al vi provizore la teoria studado de la mondlingva problemo, sed en la praktiko reunuigu vin kun la Esperantistoj! Konsideru, ke tiu solvo nur estas provizora, kaj ke la mondlingvo de l' estonteco aspektos tute alie ol iu ajn el vi kaj ni nun eble imagas! Via gvidanto, d-ro de Saussure, mem skribis en la lasta n-ro de sia gazeto, ke li ĝoje akceptos la rezolucion de la Brusela Kongreso, kondiĉe ke ankaŭ la Idistoj ĝin akceptos.

Tial, ĉiuj eks-Esperantistoj, revenu al ni, ĉiuj anoj de aliaj sistemoj, unuigu vin kun ni, por ke per komunaj fortoj ni senprokraste atingu la komunan celon!

Mi profitas de ĉi tiu okazo por atentigi pri la sekvanta propono de nia konata kunbatalanto „Zanoni“, saĝe disigi praktikon kaj teorion, por ke ni ne haliĝu per pluraj sistemoj la progreson de nia komuna ideo de L. I., kaj por ke ni tamen jam nun povu komenci teorie la kreadon de la relative perfekta estonta mondlingvo.

Mi aldonas, ke la artikolo de „Zanoni“ estas verkita jam en la komenco de 1919 kaj sendita al la redakcio de ET antaŭ kelkaj monatoj; sed ĝis nun mi ankoraŭ ne trovis okazon kaj lokon por ĝia publikigo.

Ĉiuj aliaj mondlingvaj gazetoj estas petataj represi la saĝan proponon de nia eminenta samideano.

TEO JUNG.

For la Batalilojn!

Tie ĉi praktiko — tie teorio.

La subtitolo de la ĉi-supra admono montras, ke mi ne intencas paroli pri konkretaj bataliloj — cetere la milito ja finiĝis kaj esperinde ne revenos —, sed la legantoj divenos, ke mi uzis alegorian bildon por atentigi, ke ankaŭ por ni, amikoj de lingvo internacia, venis la tempo formeti la spiritalajn armilojn, per kiuj ĝis nun ni batalis unuj kontraŭ aliaj tute senutile.

Mi do predikas pacon kaj interkonsenton inter Esperantistoj, Idistoj, aŭ per kiuj ajn nomo ili esprimas sian inklinton al la sama ideo.

Eble oni argumentos, ke konkura batalo estas utila al la afero mem. Mi ne volas nei, ke ĝi povas instigi la pionirojn de unu partio, atgrade streĉi la fortojn por superi la alian partion. Kompreneble, per tia reciproka konkurado la afero mem povas perfektigi kaj profiti — en certaj okazoj. Al la demando, en kiaj aferoj konkura batalo eble estas progresiga, ni povas respondi: Ĉie, kie la formo permesas plurajn solvojn ne detruante la ĉefan celon.

Ekzemple la ĉefa celo de la stenografio estas fiksi skribe la parolatan vorton. Al la oratoroj indiferenta estas la sistemo; ili estas kontentaj, se la stenogramo senegare reproduktas tion, kion ili diris. Al la stenografistoj universala sistemo estas agraba, sed ne necesa. Maloite okazos, ke stenografistoj transskribos la stenogramon de kolego, kaj cetere la tempo ankoraŭ ne venis, ke la stenografio estas uzata kiel universala skriba interkomprenilo anstataŭanta la ordinaran skribon. La ĉefa celo de la stenografio do ne detruigas per tio, ke ekzistas eĉ multaj sistemoj konkurantaj unu la alian. Konfirte, per la libera konkuro la eltrovemo ricevis pli vasion bazon favore al la progreso de la stenografia scienco, el kiu la praktikantoj tiras profiton.

Ĉi tiu ekzemplo sufiĉu.

Sed ekzistas aferoj, ĉe kiuj la formo estas decida por ekzisto aŭ neekzisto de la tuta movado. Al tiuj aferoj sendube apartenas la ideo de lingvo internacia. Jen kial d-ro Zamenhof proklamis la neŭseblecon de la Esperanta Fundamento, ĝis kiam la lingvo estos ĝenerale enkondukita. Saĝa, plej saĝa decido de l' eltrovinto! Ĉar la universala interkompreno — ĉefa celo de tia lingvo kaj „conditio sine qua non“! — tuj detruigis, se la interkonsentitaj reguloj kaj

vorradikoj estus arbitre ŝanĝataj dum la tempo de l' enkonduko! Ĉi tion la postaj elpensintoj de novaj sistemoj, reformemuloj kaj plibonigantoj tute malatentis. Kaj tamen ili ne laboris vane! Tre povas esti, ke en detaloj ili trovis ion pli bonan — sinceraj Esperantistoj ja neniam pretendis, ke Esperanto estas absolute perfekta —, tre povas esti, mi diras, ke veraj perloj estas troveblaj en tiaj elpensadoj. Kiel tiri profiton el ili por la komuna afero? Pro la motivo nomita ne estas saĝe, nun ŝanĝi Esperanton, kiu estas sur la plej bona vojo sin enkonduki kaj jam tiom amplekse disvastigis praktike kiel universala interkomprenilo. Tamen Zamenhof mem diris: „Se estos necese, ni poste ŝanĝos, eĉ se nenio restus el la nuna formo de Esperanto“, kaj tiel pensas, mi supozas, la plimulto el la Esperantistoj.

Konsiderinte ĉi tiun staton de l' aferoj, mi elvokis: For la batalilojn! Tie ĉi praktiko — tie teorio!

Tempo estas kaj necese, ke ĉiuj amikoj de lingvo internacia donu al si reciproke la manojn, ke ili diru: Ni ne batalu plu, ni ne fendu niajn fortojn, ni laboru kune!

La nunaj cirkonstancoj estas ekstreme favoraj por nia afero, tion ĉi ni komprenas. Sole la perspektivo, ke lingvo internacia eble fariĝos la rubando inter la anoj de la Ligo de Nacioj, estas tiel promesa, ke ĝi postulas la senpartian penadon kaj kunlaboradon de ni ĉiuj mondlingvanoj por atingi ĉi tiun celon. Sed tiel longe, kiel luktas pluraj sistemoj inter si, ĉiu laboro estos vana. Ĉar nature la registaroj ne havos konfidon al afero, kiu eĉ ne scias krei konkordon kaj unuecon inter siaj propraj reprezentantoj. Pro tio ankoraŭ unu fojon: For la batalilojn!

Restas ankoraŭ la demando, kiel efektiviĝi la devizon: Tie ĉi praktiko — tie teorio?

Linue ni publikigu alvokojn al ĉiuj mondlingvanoj. Ni diru al ili, ke unu sola, provizore neŝanĝebla formo de la lingvo estas nepre necesa por ĝia ĝenerala enkonduko. Pro tio ni akceptu Esperanton* en la nuna formo praktike, ĉar ĝi jam tiom enradikiĝis en la internacia vivo. Ni atentigu sincere, ke tio estas provizora, neevitebla metodo, kaj antaŭ ĉio, ni retenu ĉiun vorton de polemiko. Samtempe ni instigu la adeptojn de iu ajn alia sistemo kuniĝi kun ni kaj fondi instituton, kiu per speciala organo kolektas kaj diskutas senpartie ĉiujn demandojn pri ŝanĝoj kaj perfektigoj de la lingvo. Ĉi tiu gazeto do estu centra kolektejo por la teorio, por uiligu la trovoitan kvintesecon poste por la definitiva formo de la lingvo. Interterpe Esperanto* estu uzata praktike en ĉiuj okazoj, kompreneble eĉ de la menciita gazeto mem.

Koncertigo, komuna laboro, forigo de la malamikemo, jen estas principoj, kiujn postulas la nuna tempo. Kun bona volo de ĉiuj tio estas facile atingebla.

Sendepende de la morala efiko, kiun havas tia procedo, la efektiva prolo por la komuna celo estus nemezurebla. Ĉiookaze tio pifortigus niajn fortojn tiel, ke baldaŭ malaperu la bariloj, kiuj disigas nin de la definitiva triumfo.

Mi ne estas kapabla elabori detale la programon, por efektiviĝi mian ideon. Mi sole deziris instigi kaj peti la kompetentajn personojn, kiuj iniciati praktike tiun penson, kies realigo povus progresigi nian komunan aferon pli multe ol ĉiuj ĝisnunaĵ metodoj de propagando.

ZANONI.

* La nomo ne estu disputobjekto. „Lingvo Internacia“ ekzemple konvencios ĉiujn partiojn.

Esperanto kaj Foiroj.

Frankfurta Foiro.

Reklamo por kaj por Esperanto.

Por la Kvara Internacia Foiro oni preparas denovan gravan peresperantan reklamon. La foirofiĉejo serĉas la helpon de eksterlandaj E-istoj por propagando en la koncernaj rondoj, fardono de anoncoj ktp. Jen estiĝas bona okazo por profitodona eĉ por esperanta reklamo. Skribu al Messani, Esperanto-fako, Frankfurt a. M.

Lernejo kaj Studentaro.

Cirkulero de la Instru-Ministro de Braunschweig (Braunsvigo) pri Esperanto.

Stata Ministerio.
Fako: Popola Klerigado.

Braunschweig, la 20 okt. 1920.

Al la
Landaj Lernejaĵ Oficejoj
por la pli altaj kaj la Popol-Lernejoj.

Laŭ pli detala klarigo de la dekreto de la 14-a de septembro 1920 estu aspirata en ĉiuj lernejoj la morala klerigado laŭ la spirito de la Interpopola Pacigo. Grava rimedo por ĉi tio estas ankaŭ la akcelado de Esperanto. Tiu ĉi facile lernebla mondhelpingvo povas krei la fundon por senpera interŝanĝado de pensoj inter la popoloj de la tero. Neniam ĝi anstataŭu nek anstataŭos la organikie kreskintajn kulturlingvojn, sed ĝi povas kaj devas fariĝi apud ili ĝenerala, unueca helpilo de la skriba kaj buŝa interkomprenigado inter ĉiuj popoloj.

Ligante al samaj aspiroj en aliaj germanaj liberŝtatoj, do por la braunschweig'aj lernejoj estas dekretata konstatigo pri tio, kiuj instruistoj kaj lernantoj jam okupiĝis pri Esperanto kaj kiuj institucioj estas disponataj por la lernado de Esperanto, precipe kiuj instruistoj povas kaj emas instrui Esperanton kaj kiuj lernantoj emus partopreni ĉe sendeviga instruado de Esperanto.

Ni atendas pri ĉi tio raporton ĝis 31 decembro 1920, kaj ankaŭ taŭgajn proponojn, kiamaniere la komence sendeviga instruado de Esperanto povas esti akcelata. Ĉe tio povas esti konsiderata ankaŭ financa subvencio de la ŝtato per transprenado de honorarioj por la instruistoj kaj de la kostoj por la instruiloj.

Subsignis: SIEVERS.

Esperanto-instruado en ĉiuj lernejoj de Breslau (Germ.)

En la grandurbo Breslau (ĝi estas la ĉefurbo de Silezio kaj havas pli ol 527 000 loĝantojn kaj 200 lernejojn) la lerneja konsilantaro decidis la 3-an de novembro la enkondukon de la Esperanto-instruado en ĉiuj lernejoj. Vivu nia kara lingvo kaj niaj ideoj!

Gesamideaĵoj en ĉiuj landoj! Bonvolu apogi nian movadon kaj bonvolu sendi poŝtkartojn ilustritajn, poŝtmarkojn, sigelmarkojn ktp. por vigligo de la instruado kaj por stimulo por la infanoj al instruisto Seb. Braschke, Breslau I, Garvestr. 13, al kiu estas transdonita la gvidado de la afero.

Esperanto-Asocio de la Germanaj Instruistoj.

Celante la enkondukon de Esperanto-instruado en la populaj lernejoj, la „Landesamt für das Bildungswesen“ en Hessen rondirigis oficialan demandaron kaj postulas respondojn: kie oni jam instruis Esp. al infanoj kaj kian sukceson oni havis rilate la progreson, kie estas Esp. instruistoj kaj kiel granda estas ilia intereso kaj kia ilia okupado pri Esp. Saman rondemandon (cirkuleron) oni intencas en Braunschweig kaj post kelka tempo en Saksujo. Ni do staras ĉe la komenco de epoko, kiam Esp. fariĝos „oficiala“ lingvo. Tial kaj pro kiel eble plej detala statistiko ampleksa — ĉar el eksterlando oni postulis jam tiajn klarigojn, ekz. el Finnlando —, mi urĝe petas, tiuj informante skribi al mi: kie oni instruas nuntempe Esp. (en popola, reala, supera reala, gimnazia, seminaria, popolalita lernejo ktp.) kaj kiel (ĉu private, laŭvole aŭ devige). Mi same instis petas, ke ĉi Esp. instruistoj, eĉ pli altaj instruistoj, en Germanujo aliĝu kiel eble plej baldaŭ al nia Asocio

(jara kotizo 2 mk.), por ke ni fariĝu tre efika Esperantista aro! Sendu, bonvole, skribaĵojn aŭ monon kun via adreso al MAX SYKORA, instruisto, prezidanto de „Esp. Asocio de la Germanaj Instruistoj“, Dresden-N., Martini-Luther-Str. 6/II, Stadtgirokonto Dresden, Gerokstr. 11287, Bankkonto Dresdner Bank, Filiale Albertplatz Nr. 3225.

Kursoj en vienaj lernejoj kaj por aŭstraj ĝeinstruistoj.

En la burĝa kaj popola lernejo de la „Marih-Fratoj“ en Wien-Gersihof la lerneja estraro mem aranĝis Esperanto-kursojn por la lernantoj. Tie ankaŭ la prezidanto de la Katolika Unuiĝo E-ista en Wien, revid. Frey, gvidas kursojn por la Marih-Fratoj-instruistoj.

Same kurso estas gvidataj de la cand. phil. Emmy Pockberger en la „Kat. Seminario Instruista“ en XVIII, Michaelerstr.

Por ekzistigi katolikajn E-ĝeinstruantojn rigarde la Unuan Ika-Kongreson en Graz 1921, la Kat. Unuiĝo E-ista en Wien komencis la 6-an de nov. grandan kursojn precipe por ĝeinstruistoj, je kiu partoprenas pli ol 70 ĝeinstruistoj, profesoroj, kaj ĝeocicistoj. Instruas la Aŭstruja landdirektoro de la „Internacio Katolika“ burĝlerneja direktoro J. Schamaneĝ, lektoro por Esp. ĉe la „Teknika Altlernejo“.

Revid. Siedl gvidas kursojn por la „Aŭstruja Krist. Germ. Studenta Ligo“.

Gravega afero estas ofica kurso en la „Popola Altlernejo“, XVIII, Semperstr. 45, gvidata de la tre konata s-ro redaktoro Schröder. Pluj kursoj aranĝoj.

En belga lernejo.

En Antwerpen okazos kurso de s-ano Schoofs en la „Meisjes-gemeenteschool“ por la studentoj de malaltaj superaj lernejoj, dimanĉe kaj ĵaŭde.

Internacia Propagando inter Universitataj Studentoj.

La monata, nun ĉiusemajna gazeto „Gand-Universitè“, organo de la „Association Générale neutre des Etudiants“ (Ĝenerala neŭtraj Asocio de la Studentoj), dezirus malfermi, per Esperanto, Internacian Rubrikon. Necesas pro tio, ke almenaŭ unu student(in)o el ĉiu universitato konsentu sendi regule ĉiumonate raporton pri la studenta vivo ĉe tiuj universitatoj (societoj, festoj, ekskursoj, vizitoj, specialaj organizaĵoj, okazintaĵoj, k. c.). Reciproke raportoj pri la Ĝen'ra studentaro estos sendata al ĉiuj gekorespondantoj.

La unua numero de la jaro 1920-21 (19-a de oktobro) enhavis poresperantan artikolon. Dependas nun de la nombro da respondoj al la ĉi supra peto, ke Esperanta raportoj aperu en „Gand-Universitè“.

Por plifirmigi la rilatojn inter la ĉiulandaj studentaj organizaĵoj „G.-U.“ proponas, ke ĉiuj studentaj gazetoj faru same, kaj plie sendu al ĝi 2 (du) ekzemplerojn de tiuj organoj (ĉu esperantaj, ĉu nacilingvaj), interŝanĝe. Ĉu ekzistas en via lando: Nacia Studenta Asocio aŭ io simila? Ĉiuj korespondantoj kaj interŝanĝaj sendaĵoj estu adresataj: Belgujo, Gand-Universitè, Hendriex V., studento, rue du Saumon 43, Gand.

Gestudentoj universitataj nepre skribu! Gelegantoj konigu nian peton al viaj gekonatuloj-studentoj!

Aliaj ĵurnaloj bonvolu represii.

Kroniko.

Belgio.

La Esp.-movado pli kaj pli vigliĝas. Ĉe la Internacia Muzeo en Bruxelles estas Esp. sekcio en la Palaco du Cinquantenaire (videbla ĉiutage de 10-3 h). En Antwerpen kurso de s-ro Schoofs kun pli ol 100 lernantoj kaj alia en lernejo por studentoj de malaltaj superaj lernejoj. Pluj kursoj en Brugge, Gent, Lodeberg, Liège kaj St. Gilles. Malaperos la revueto „Nia Polico“ post dujara bona laboro por Esp. kaj reaperos „Belga Esperantisto“ (adreso: Schoofs, 45 Kleine Beersstr., Antwerpen).

Estonio.

TALLINN. La intereso pri Esp. ĉiam kreskas. Estas aranĝita kurso kun 44 partoprenantoj, kiuj plejparte aniĝis al la „Espero“, kiu tial havas nun jam pli ol 160 anojn.

Germanio.

KOBLENZ. Pluraj kursoj komenciĝis. Kuvonoj ĉiunvendre en rest. „Union“, Löhstr. 75.
STOLBERG. La 5 nov. komenciĝis kurso gvidata de s-ro Faber. Inter la 20 partoprenantojn troviĝas 5 instruistoj.

Hungario.

BUDAPEST. La 22 okt. estis tre vigla vespero en la Socia Muzeo. Tri prelegadoj okazis. Je 5.50 h. s-ro Al. Laquer malfermis per interesa propaganda parolado la tuteŭropan Esp. kurson organizitan de Germ. Esp. Asocio. La ĉambrego tute pleniĝis. 25 personoj anoncis sin al kurso, kiu tuj komencis s-ro J. Mateffy. — Dumtempe s-ro d-ro L. Lorand en alia ĉambrego lanĝis por E-istoj pri la sepa kongreso kaj ĝiaj festoj. — En la antaŭĉambro post la kurso s-ro P. Balkanyi faris longan parolon pri historio kaj malbonigo de t. n. reformprojektoj. — S-ro Francisko Badal sub nomo „Profesoro Esperanto“ faras artistajn prezentadojn en la provinco.

GAZETARO. La ilustrita gazeto „Vasarnapi Ujsag“ (IV., Egyetem u. 4) enhavis en n-ro 19 de 15. okt. du bonajn bildojn pri la Haga Kongreso kaj la bildon de d-ro Zamenhof. (Por unu germana marko oni povas ricevi ĝin.)

Kalifornio.

La 10 okt. okazis la Kvina Kongreso de la Kalifornia Esperantista Rondaro. Detaloj sekvas.

Spiritualismo.

Samideanoj, kiuj sin okupas per studado de spiritualismo! Spiritistoj! Okulistoj!

Granda trezoro da fortoj, kies malkovro certe gvidus al pli bona estado de l' homaro kaj al pli bona kompreno de l' homa vivo, estas ankoraŭ kaŝita antaŭ ni. Ĉu ne estus ebla ankaŭ en tiu fako tutmonda kunhelpo per Esperanto?

Aro da senlaci esplorantoj, kies gvidanto estas nuntempe MUDRO K. VOJACEK, serĉas seriozajn kunlaborantojn en la tuta mondo. (Programo: 1. Senĉesa interrilato inter la esplorantoj, necesega! 2. helpa servo pri fakaj gazetoj kaj ĝ. se eble, fakaj kunvenoj dum la universalaj kongresoj Esperantistaj.)

Ĉiu samideano emanta kunlabori anoncu sian adreson al O. SKLENĈKA, del. LIEA, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakio.

Teozofio.

La Teozofia Esperanta Ligo ĵus estas restarigita.

Tiu ligo fondiĝis antaŭ la milito havis multajn membrojn en ĉiuj landoj kaj posedis periodan gazeton kaj multegajn abonantojn.

La teozofia movado fariĝas ĉiutage pli kaj pli grava, kaj ĉiuj teozofistoj opinias, ke la lingvo Esperanto estos mirinda „ilo“ por atingi la noblajn celojn de la Teozofia Societo. Ju pli ni estos multaj, des pli nia agado estos efika.

Ĉiuj malnovaj membroj kaj ĉiuj esperantistoj kaj teozofistoj interesigantaj je tia movado, sendu aliĝon kaj sin turnu al S. FRANK, 21 rue alain chartier, Paris XV (Francujo).

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaĵa.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (5-a daŭrigo.)

Poste Lozinski mem al mi konfesis, ke tiutempe li havis tiajn pensojn, kiaj neniam venis en lian kapon en Loziŝci dum plugado, nek en la najbara urbedo dum la ĉiujara foiro, nek eĉ en preĝejo. Tio ĉiuj liaj pensoj estis pensoj ordinara, kiaj konvenis al la loko kaj al la tempo. Sed sur la oceano la pensoj estis tute novaj, tute eksterordinaraj. Ili de ie leviĝis, simile al tiuj maraj fajroj; li penadis ilin ekzameni pli atente tiel same, kiel tiujn fajrojn, sed al li tio ne prosperis. Dum li ne atentis ilin, la pensoj sekvis unu la alian, ekflamante kaj estingigante, karesante la animon kaj la koron. Sed tuj kiam li penadis ilin halfigi kaj esprimi per vortoj, li malaperis, nur la kapo al li doloris kaj turniĝis...

Kompreneble, la senokupeco kaŭzis ĉion ĉi tion, kaj ankaŭ la oceano, kiu moviĝis antaŭ liaj okuloj, balanciĝis, sonoritis, eligis brilon, ĝin estingis kaj kuris kaj kuris al senlimo...

En la tria tago de ilia vojaĝo, starante sur la ferdeko kaj rigardante antaŭen, li vidis ŝipon. En la komenco ŝajnis al li, ke eta ludila velŝipeto enreĝiĝis inter la ŝnuregardo de ilia ŝipo. Tiel ŝajnis al li, ĉar la aero, klara kaj travidebla, ĉion alproksimigis, kaj ĉirkaŭe nenio prezentigis krom akvo. La velŝipeto balanciĝis kaj kreskis, kaj kiam ĝi estis jam tute proksima, Mateo vidis sur ĝia ferdeko gajhumorajn homojn, kiuj ridis, sendis salutojn; kiuj marveturis pluen, kvazaŭ ili havis nenialajn zorgojn kaj aferojn, kvazaŭ ilia vivo ĉiam

irus same gaje, kiel tiu ilia ŝipo, movata de favora vento... Aliafoje, dum forta ventego, kiam ĉe la ŝipantaŭaĵo staris nubego da ŝprucaĵoj, li denove ekvidis tian saman ŝipon, kiu, kliniĝinte flanken, flugnaciis birdosimile. La ondoj leviĝis kaj malleviĝis kiel montoj, kaj Lozinski kaj aliaj pasaĝeroj korpemite rigardis kaj ne vidis plu la sentiman ŝipon. Sed jen ĝi re aperas sur la ondoj, ree ĝiaj veloj tuŝas la marŝaŭmon, kvazaŭ flugiloj de mevo, kaj ree ĝi balanciĝas, ree ĝi iras, iras kaj balanciĝas... Tiam Lozinski pensis, ke tie, sur la velŝipo, sendube jam troviĝas Amerikanoj. Homoj sentimaj, videblaj! Kaj jen li nun ŝipveturas al ili, li, simpla, timema Loziŝcano... Kian akcepton li ĉe ili trovos? Ĉu li lin bezonos? Kia li fariĝos post deko da jaroj?

Al li ekŝajnis, ke li jam fariĝis ia alia, ne tiu viro, kiu antaŭ nelonge laboris per plugilo en Loziŝci aŭ dum festo promenis en la foiro de l' najbara urbedo. Jen li vidas la senhalte balanciĝantan maron, la ŝipojn, iajn strangaĵojn, fremdajn homojn... Jen liaj okuloj rigardas la misterojn de la mara profundegajo, li sentas tiujn misterojn, li pensas pri ili, pensas pri tiuj fremdaj homoj kaj pri si mem, pri sia baldaŭa alveno al ili, — ĉio ĉi faras lin kvazaŭ tute alia homo. Kaj li fikse rigardas antaŭen, rigardas la helan bluaĵon de la ĉielo aŭ la malhelan kurienon de l' supermaraj nebuloj, kvazaŭ serĉante tie sian lokon kaj sian estontecon...

En unu el tiaj momentoj, kiam la ĝis tiam nekonaĵaj pensoj kaj sentoj enlaĝis el la profundo de lia malluma animo, kvazaŭ fajreroj el la nigra mara abismo, li renkontis Diman sur la ferdeko kaj demandis lin:

„Aŭskulu, Dima. Kion vi pensas pri ilia tiea libereco? Kio ĝi estas?“

Sed Dima kolere respondis:

„Iru for...“ aldoninte kelkajn insultvortojn.

La kaŭzo estis, ĉar por la malfeliĉa Ivano Dima la tuta Dia mondo perdis nun sian valoron. Ĉar, kiam la ŝipego estis balancata dekstren kaj maldekstren, jen de la ŝipnazo al la ŝipa malantaŭaĵo, jen en la mala direkto —, tiam ŝajnis al Ivano, ke la ĉielo tuj estas renversigita en la maron, kaj post tio la maro per sia tuta maso estas grimpona supren por atingi la ĉielon. Pro tio la malfeliĉa Dima havis teruran kaptarniĝon, naŭzon, li ofte aliris al la ŝirando kaj pendis kun la kapo malsupre, kvazaŭ ĉifonajo, pendigita al plektobario por esti sekigita. Dima suferis terure, li kriadis, ke la malbeninda maro eksterenigos lian tutan internacion; li petegis, pro Dio petegis, ke la ŝipego haltu ĉe lu insulo, ke oni lin, Diman, elŝipigu eĉ ĉe sovaĝuloj, se oni ne volas pereigi kristanan animon. Komence Mateo tre miris, ke Dima aperigas tian kaprican karakteron kaj provis eĉ lin hontigi. Sed poste li certigis, ke ne Dima sola tion faras: multaj respektindaj pasaĝeroj, eĉ la svedaj kaj danaj fraŭlinoj, kiuj veturis Amerikon por dungigi tie kiel ĉambristinoj kaj kuliristinoj, tiel same estis pendantaj ĉe la ŝirandoj, suferantaj la saman malfeliĉon, kiel Dima. Tiam Mateo komprenis, ke sur la oceano ĝi estas afero ordinara. Li mem kelkfoje havis malagraban senton, — nenion plu, — dum Dima, kiu estis nervulo, malbenadis sin mem, kaj Osipon, kaj Katerinon, kaj ilian ŝipegon, kaj tiun, kiu ĝin elpensis, kaj ĉiujn Amerikanon, kaj tiujn, kiuj ankoraŭ ne estis naskitaj... Iafoje, ŝajne, li estis jam preta blasfemi, sed li sin detenadis... Ĉar sur la maro tio vere ne estas tiel facila, kiel, ekzemple, sur la tero...

(Daŭrigo.)

Polico.

En Lisboa (Port.) refondigis Esp. Portugala Policia Societo (adr. Sta Maria St. n-ro 205 - 1). La societo funkcias sub la patronado de la policomandanto. Prezidanto estas policestro Antonio Dorges Delgado.

Notoj.

Esperanto Triumfanta.

Oni sendis al ni ekzempleron de la New-York'a gazeto „The Sun“ (30 okt.), en kiu ni legas en grandaj literoj: „Esperanto was 3 miles ahead at the finish“. Tio estas titolo de longa raportoj pri konkurso inter fiskapistaj ŝipetoj, kiu okazis ĉe Halifax (Nova Skotio) la 30-an de oktobro. Ni gratulas la kapitanon de la venkinta skuno pri lia sukceso kaj pri la fakto, ke li alprenis la nomon „Esperanto“ por sia ŝipeto kaj famigis la nomon de nia lingvo tra la fiskapista mondo. La raportoj estas profetaĵoj de la tago, kiam la mondo ekscios pri la venko de nia propra „Esperanto“ kontraŭ ĉiuj ĝiaj konkurantoj. (W. M. P.)

Ankaŭ „The New York Herald“ raportis en sia numero de la 31-a de okt. pri la afero kaj aperigis grandajn ilustraĵojn pri „Esperanto, pride of the Gloucester Fleet“ kaj pri ĝia sukcesinta kapitano s-ro Marty L. Welch.

Naĝanta Ekspozicio.

En holandaj komercaj rondoj oni projektas gravan transoceanan entreprenon. La demando estas pri konduko de granda specimena ekspozicio trans la oceanon al ĉiuj grandaj komerclokoj de l' kontinento. Per naĝantaj foiroj Holando intencas malnecesigi la vojaĝadon de la transoceanaj firmoj kaj ligi en la fremdlandoj mem novajn komercajn interrilatojn por holandaj produktadoj. La naĝanta specimena ekspozicio veturos de lando al lando, unue al grandaj havenoj de Norda kaj Suda Ameriko, poste okazu dua vojaĝo al Norda Afriko, Brita Indio, Holanda Indio, Malantaŭa Indio, la Filipinaj Insuloj, Ĉinio kaj Japanio. Por la entrepreno estas destinita la 6000 tunhava vaporsipo „Macedonia“, en kiu oni konstruis ampleksajn ekspoziciajn halojn; surŝipe troviĝos speciala negoca centro. La unua vojaĝo estas preparata.

Grafologio.

Gesamideoj dezirantaj ricevi certan, sciencon respondon pri siaj karakteroj, emoj kaj kvalitoj, sendu 2-paĝan leteron, nature kaj senripense skribitan (nek dikte nek kopie) al GRAFOS, Casella postale 47, PISA (Ital.) ĉesadente i. ital. lir. (en nacia monno laŭ nuntempa kurzo aŭ resp. kup.) por respond-esperezo k. a. (sciigu laŭdire ankaŭ pseŭdonimon krom la subskribo) La respondoj laŭvice aperos en ET.

Unuaj Respondoj.

N-ro 42, Genova. Bona kaj logika sed ne tre klera intelekto, iaj artaj emoj, pacienca ne trudema volo, nedecideco, fortaj sentoj, prizorgoj, kaŝemo, malordemo, ofendensentemo, negranda fantazio. — Oni skribu en Esperanto!

W. P. el L. (Angl.) Tre klera kaj instruita intelekto, meza fantazio, malforta nekonsistanta volo, bongusto, granda sentemo, sindonemo, sincereco, ordemo, timemo, senforteco, laceco, maljuneco. — Simpatiema karaktero de klera kaj sentema viro, eble trapasinta longan, ne tre feliĉan vivon por sia sindono kaj malforta volo.

G. H. en P. (Ĉeĥoslov.) Negranda, kvankam instruita intelekto, fantazio, energio, voluptamo, malhumileco, egoismo, emoj al mislikismo, jaluzeco, ofendensentemo, nesincereco, amo je vulgaraĵoj. — Tre nekroma karaktero, komplikata de diversaj, eĉ malaj emoj: nenormala, zorginda persono.

Maja Rozo. Sentemo, ordemo, bongusto, fantazio, spriteco; melankolia kaj kaŝema temperamento.

Don Quichote. Vi ne plenumis la skribkondiĉojn; reskribu laŭvole senpage, sed pli atente! Ni rimarkigas ke Grafologio ne povas diveni la ĝustan aĝon, la fizikajn kvalitojn, aŭ antaŭdiri la estontecon, sed nur sufiĉe trafe respondi pri la morala karaktero, spiritaj emoj kaj kvalitoj de persono.

Grafos.

Daŭrigu vian abonon!

Ni petas la ĉi-sube indikitajn abonintojn repagi sian abonon ĝustatempe, por ke ili seninterrompe ricevu nian ĵurnalon.

Abono finiĝis je n-ro 6:
Schelder en Plauen.
Abono finiĝis je n-ro 7:
Belenguer en Teruel. Goldsmith kaj Biddle en Birmingham. Rose en Hagen. Schmitter en Kirdorf.

Abono finiĝis je n-ro 8:
Boven en Rotterdam. Sieler, Lapp, Landau, Umanski, Clair, Reisinger, Spiro, Klopman, Marcus kaj Halter en Genève. Jahn kaj Schmitz en Godesberg. Ostermann, Hezel, Schneider kaj Schmidt en Gera.

Abono finiĝos je n-ro 10:
Finholdt en Akersbakken (10 abonoj). Kirschner, Hevesi, Kalocsay, Felsenfeld kaj Szabo en Budapest. Kardos, Weisz, Milosovits, Rosner kaj Steiner en Győr. Rother en Krefeld. Becker en Mainz.

Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldonado de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

ORIGINALA SPECIALRAPORTO DE LA HUNGARA ESP. SERVO.

El hungaraj infan-kajeroj.

(Kvindek mil malsatantaj infanoj en Budapeŝt.)

„Kion mi matenmanĝis hieraŭ? Mi hieraŭ matenmanĝis nenion. Kion mi tagmanĝis hieraŭ? Mi supon tagmanĝis. Kion mi vespermanĝis hieraŭ? Hieraŭ mi nenion vespermanĝis.“

Tiun ĉi paĝon mi elŝiris el la kajero de malgranda studento el la 3-a klaso de popollernejo. Mi konvinkigis pri la afero. Li skribis veron. Krom li ankoraŭ naŭ manĝis nur unufoje en la tago, sep manĝis nur panon, du manĝis nur supon el 540 infanoj. 175 infanoj manĝas dufoje dum la tago, el ili 14 nur panon. 75 ricevas ankoraŭ militkafon aŭ tason da supo. Trifoj manĝis panon 37, krom tio ankoraŭ militkafon aŭ unu pomon 54. Car el tri panpecoj dumtage — eĉ aldonante tason da militkafon — ne povas vivi kaj plenkreski 8-ĝis 12-jara knabo, estas do evidente, ke el la nomitaj 540 infanoj 169 malsarmortos. Ne subite! Nur malrapide ili kadukas ne povante plenkreski. Ecipe, se la malgranda epidemio komenciĝis: morbito, influenco aŭ la ain, kiu poste rapide finos kun iliaj malfortigitaj korpecoj.

Sed ĉi tie estas ankoraŭ kelkaj kajerpaĝoj el mia kolekto. La konfeso de la studentoj de antaŭurba lernejo:

„Nur nia malgranda suĉinfano matenmanĝis — senpagan lakton. Tagmeze mi jam estis tre malsata. Hieraŭ mi ricevis en la popoldomo tagmanĝon. Por vespermanĝo estis terpomoj kuiritaj en salumita akvo.“

„Mia hieraŭa manĝaĵo: Mi matenmanĝis nenion. Tagmanĝe mi ricevis panon. Por vespermanĝo mi manĝis nenion. Kelkfoje mi kutimas pli bone manĝi.“

„Kion mi manĝis hieraŭ? Hieraŭ matene, kiam mi venis en la lernejon, mi manĝis tason da nigra kafo kaj unu panpecon. Kun tio mi estis ĉe la instruado ĝis la unua horo posttagmeze. Tagmeze, kiam mi iris hejmen, estis iom da terpom-kuirajo; mi ne povis sufiĉe manĝi da ĝi, ĉar oni ne povis sufiĉe multon kuiriri. Vespere eĉ pli malmulte estis, ĉar mi ricevis nur iom da pano por vespermanĝo. Ofte mi repensis al la pactempo. Mi tiam manĝis kafon kun lakto, blankan panon, viandon kaj farunaĵon, ĉiutage farunaĵon. Kiam venos denove tiu ĉi bona tempo?“

„Matene kiam mi levigis, mi petis de mia patrino matenmanĝon. Ŝi diris: Jen mia fileto, iom da pano! kaj mi diris: Bone, mia patrino, mi iros en la lernejon! Kiam mi hejmeniris, mi pensis, ke estas bona vianduspo hejme. Sed kiam mi petis de mia patrino tagmanĝon, ŝi diris: Jen mia fileto, peco da pano! kaj mi komencis lerni kaj atendis la vespermanĝon. Mia patrino diris: Jen mia fileto, por vespermanĝo peco da pano!, kaj je tio mi kuŝiĝis.“

„Mi hieraŭ matenmanĝis teon kaj pecon da pano, je tagmanĝo estis supeto, je vespermanĝo frititaj terpomoj. Nia pankarto elĉerpigis, ni havas malmultan monon. Mia patrino mortis kaj mi ordigas la ĉambron, kaj la patro kuiras.“

Dudek mil infanoj malsarmortos dum la vintro laŭ la statistiko. Tiom nutris jam en 1917 la „Infanmika Societo“, kaj tiam ankoraŭ ni estis en bona stato, ankoraŭ ne fariĝis tiu ĉi nuna „paco“. Laŭ la malnovaj spertoj ni povas fari la krucsignon super dudek mil infanoj; sed laŭ la lastjara statistiko, minimume kalkulte, almenaŭ kvindek mil tiaj infanoj estas hodiaŭ en Budapeŝt, kiuj korpe kaj anime kripliĝas pro manko de nutraro. Kiu tion ne kredas, starigu sin antaŭ iu ajn antaŭurba lernejo, kiam tagmeze eldoniĝas la multaj degeneritaj infanoj, kiuj tiun tagon ankoraŭ ne manĝis. Iliaj grizaj vizaĝoj, iliaj senlumaj okuloj respugulas la malsaton. Aŭ iru en la (per usona mono) bone instalitan kuracistan malsanul-ĉambron de la „Landa Infanprotektanta Ligo“, tie el dek infanoj ok havas rakiton kaj du tuberklozon.

Mi estas virino, la infanploro disŝiras mian animon. Kiam mi vidas, ke pro manko de tolvindiloj oni envolvas la suĉinfanojn en gazetpaperon, ke la sensuaj piedoj de la pli grandaj frostiĝas, jam mi ne plu pripensadas, sed mi petas de tiu, kiu havas, de anglo, de svislandano, de nederlandano ktp.

Nun ankaŭ mi petas de tiu, kiu havas: ŝuon, vestaĵon, tolaĵon, kies materialon ni devas alpori el eksterlando, por kio ni devas pagi frankojn, fonton, ĉe kiu nia lando ne povas aĉeti.

Sed la nutraĵoj de tiuj ĉi malsat-mortantaj infanoj oni povas aĉeti hejmlande por hungara krono! El 150 kronoj povas ĉiutage unufoje satmanĝi unu infano dum unu monato! Por 1200 kronoj dum la tuta vintro! (1200 kronoj nun estas 24 sviz. fr., 3 dolaroj, 1 angla pundo, 12 hol. guldenoj.)

Ni tre ruinigis. El la loĝantoj de tiu ĉi malfeliĉa urbeĝo milionon turmentas la zorgo de ĉiutage vivado, nur eble ducent mil restas, kiuj ĉiutage satmanĝas, kiuj ĉiuj povas manĝi viandon, kiuj tagmeze kaj vespere povas manĝi varman nutraĵon.

Kvindek mil hungaraj infanoj malsatas en Budapeŝt. Ĉiu konu sian devon!

EVELINO JULIAN.

(Az Uisig, Hungario, 24. X. 1920.)

NOTO: Kiu ĉi tiun raporton tradukas kaj komunikas en nacia ĵurnalo, ricevos Esp. libron el la hungara literaturo. Gezetnumerojn sendu al Hungara Esp. Servo, Páuló Balkanyi, Budapest VI, Hajos-utca 15 - II - 2.

LETERO EL POLIO.

Bydgoszcz, novembro 1920.

Jam la duan fojon dum sia dujara ekzisto post ricevo de libereco kaj sendependeco, la pola ŝtato kreas la tiel nomitan „Centralo de Devizo“, t. e. oficejo, kiu sola havas la rajton vendi la fremdlandan monon kaj vendos ĝin kompreneble nur al tiuj, kiuj vere provas la necesecon pagi eksterlandan por komercaĵoj necesaj por nia lando. Tiamaniere oni malhelpus en alta grado la importon de luksaj objektoj tute ne necesaj por la malriĉa komuneco. Car ni nur konsideru kaj ni konvinkigis, kiom el ni, precipe el la sinjorinaro, malgraŭ la teruraj tempoj, eksemas la monon por elegantaj kaj multekostaj vestaĵoj kaj aliaj luksaj objektoj, kiel la sinjorinoj en la tiom riĉaj landoj kiel ekzemple Francio aŭ Ameriko!

Fremdulo, kiu alvenus la unuan fojon en nia ĉefurbo Varsovio kaj estus vidinta la elegantajn kaj ornamitajn varsoviaĵojn, eĉ por momentoj ne konsentiĝus, ke li trovas sin en urbo de ŝtato batalanta kontraŭ vera mizerigo, se lin pri tio ne konvinkus la kurzo de nia marko.

La manio de la lukso tamen ne pli frue malaperos, ĝis kiam la lukso estos malpermesata per iu leĝo aŭ ordono, kiel ekzemple la komercado en restoracioj post polica horo, la vagado dumnokte sen permes-karto, la ĝeno de publika paco ktp. Tia leĝo tute ne estus novaĵo. Oni jam aplikis ĝin dum la mondilito, interalie ankaŭ en Italio, kie oni malpermesis porti tro longajn ŝu-fibilingojn. Ĉiu policisto posedis mezurilon kaj estis rajtigita mezuri la fibilingon kaj ĝzuri la malobeeman elegantulinon al protokolcio.

La batalo kontraŭ la lukso atingas tre malnovajn tempojn. Ediktoj kontraŭ la lukso ekzistis jam en antikva Romo. En la meztempa epoko havis plej multe okazon eldoni tiajn ediktojn la francaj reĝoj. Konataj estas la ediktoj de Karlo IX., Henriko IV., kaj du el la jaroj 1613 kaj 1654 de Ludoviko XIII. Kaj dum tiu tempo Milano kaj Venezia vendis en mondfoiroj luksajn objektojn kaj antaŭ ĉio multekostajn silk-brodaĵojn. Kompreneble, ke la ediktoj malhelpis tiun aferon, kaj la koncernaj urboj klopodis, por ke oni ne konservu tro longe la eldonitajn ordojn kaj ke oni ne apliku ilin tro ekzakte. Kiom da urboj preferus hodiaŭ, ekzemple ĉe ni, ke ne estu eldonitaj similaj ordonoj?

Ambicio kaj flateco naskiĝas kune kun la homo kaj estas naturaj leĝoj. Tiuj naturaj leĝoj aperas preskaŭ ĉe ĉiuj homoj. Eĉ la sovaĝulo el la interno de Afriko aŭ Polinezio estas fiera, povante enŝovi en la bukian kapon kolorigitan plumon aŭ tiri brilantan objekton el kupro tra la nazo.

Kial do io simila ne estu permesata al la eleganta varsoviaĵo?

Tiujn alnaskitajn leĝojn povas pribatali la sana intelekto, sed saĝe pripensita malpermeso multe helpus al la sana intelekto. Se ekzemple la ornamemulinojn minacas mallibereco kaj publikigo de la juĝo pro la uzado de eksterlandaj parfumo kaj silkoj, kiujn nia lando ne produktas, plue, se tia malpermeso ne koncernus sinjorinojn de „facilaj moroj“ kaj iliajn adoretantojn, oni ankaŭ ne bezonus plu aĉeti tiom da eksterlanda valuto. Se tia leĝo estus eldonita, la polico gardus certe, ke oni ankaŭ sekvu tiun leĝon. Ĉiu policisto volonte fleksiĝus por mezuri la tro longan ŝu-fibilingon de la elegantulino.

Por la direkta aŭ nedirekta plibonigo de nia valuto ni devas ekpreni eĉ la plej miltigajn rimedojn.

FRANCISKO PRENGEL.

Esperanto-Verlag Berlin S 59

Friedrich Eilersiek --- Wissmann-Str. 48
(Germanujo).

Esperanto-eldonejo kaj libro-eksportejo liveras ĉiujn haveblajn librojn el Germanujo, eldonas Esperantajn verkojn kaj la gazeton

„Esperanto-Praktiko“

ĉiumonata organo por perfektigo en Esperanto.

Esperanto-Katalogo senpage, specimena numero de la gazeto kontraŭ 1 respondkupono aŭ 1 Mk. germ.

Specialaj katalogoj pri germanaj libroj laŭ deziro.

KORESPONDO. Kovno (Litovujo). Leŭtenanto I. Mastijunas, 4³³ p. pulkas, per L. PK, PI kun la tuta mondo.

KORESPONDO. S-ro J. Munter, cath singel 28 bis Utrecht, Holando, deziras korespondi kun ĉiulandaj Universitataj ĝisjunuloj.

Abonojn al ET

oni bonvolu pagi per resp.-kup. (15 por 10 n-roj) aŭ prefere per ŝtataj bankbiletoj. Ni liveros por 20 gmk. 12 n-rojn de ET, por 10 ŝil., 10 sv. fk., 10 pesetoj, 10 nordaj kronoj aŭ 5 hl. 35 n-rojn, por 10 fr. fk. aŭ 1 dolaro 20 n-rojn, por 10 italiaj liroj 15 n-rojn, por 10 finnaj mk. 10 n-rojn. — Tiuj ĉi prezoj valoras por ĉiuj landoj kun valuto pli alta ol la germana. Al Germanio, la Balkano aŭ la Baltikaj landoj ni liveros 10 n-rojn por 10 gmk., al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 Kĉ. Specialajn prezojn por Aŭstrio, Hungario, Polio kaj Estonio oni demandu ĉe niaj respektivaj reprezentantoj.

Niaj Abonejoj.

AŬSTRIO.
Esp.-Societo por Stirio, Graz, Schönaugasse 6.

ĈEĤOSLOVAKIO.
Otto Skleněka, Hradec Kralovė.
Prof. J. Süsler, Saaz 687.

ESTONIO.
Helmi Drezon, sekretario de Est. Esp. Unuiĝo „Espero“, Riiüli t. 6, Tallinn.

GERMANIO.
Postscheckkonto Köln 708 63, Teo Jung, Horrem Bez. Köln.

HUNGARIO.
Pauilo Balkanyi, Budapeŝt, Hajos-utca 15, II, 2.

POLIO.
Adolfo Oberrotman, Warszawa, Krak. Przedm. 10.

PORTUGALIO.
Agencia Esperantista, Silva & Carreira, Rua da Assunção 42, 5.

Recenzejo.

Mala Recenzo.

En nia 7-a numero ni publikigis la recenzon de nia kunlaboranto Babeor pri la verketoj „La rozujo ĉiumiljara“ kaj „La verda kakatuo“. Pri la unua libro la recenzo estas sufiĉe malfavora, dume pri la alia ĝi estas laŭdega. En la ĵus aperinta 3-a kajero de „Kristana Espero“ ni trovis recenzon tute malan. Ĉar la redaktoro de ET pro manko de tempo ne tralegis la du verketojn, li estas pri ili tute senpartia kaj, pro kaŭzo de justeco, represigas ĉi-sekvante la recenzon el KE.

LA ROZUJO ĈIUMILJARA. Malofte oni renkontas tiel bone skribitan libron, kiu apartenas al la plej bonaj rakontoj eldonitaj dum la jaro 1916. Ĉiu esperantisto, kiu ne legas ĝin, multe perdos. Stilo modeltata.

LA VERDA KAKATUO. Senvalora miniatura dramo, okaze de kiu oni devas atenti, ke oni iraduku nur la plej bonan literaturon en Esperanton. Tiamaniere la valoro de nia lingvo plej bone altiĝas. Ni do aĉetu kaj legu nur bonan literaturon, liam ĉesos la eldonado de malbona simila. (H. S.)

Ĉu eble unu de la recenzintoj erare ŝanĝis la titolojn? Jen montrigas la vereco de la diraĵo: „La gustoj de la publiko estas diversaj“ (ankaŭ la gustoj de la recenzantoj).

LIBROJ.

CINDRILINO, kaj aliaj teatraĵetoj por la infanoj. De Louise Briggs. London 1920. Brita Esperantista Asocio, 17, Hart Street, WC 1. 24 p. 14 s. 21. Prezo 1 ŝil.

La ĉi konataj fabeloj pri „Cindrulino“ kaj la sep viroj“ kaj aliaj jen estas formitaj al simple kompreneblaj, facile reprezentemaj ĉarmaj teatraĵetoj. La nomo de la aŭtorino, iraduktinto de „Songo de Somermeza Nokto“ el Shakespeare sufiĉas por certigi korektan stilon. La ludoj bone taŭgas por entuziasmiĝi infanojn al Esp. kaj por propagandi per ilia reprezentado ĉe la publiko. (R-ano.)

LA KVAKERISMO. Eldonita de Friends' Council for International Service, Ethelburga House, 91, Bishopsgate, London EC 2. 16 p. 12 s. 18. Prezo 2 pencoj.

„Mallonga skizo pri la historio kaj kredoj de la Religia Societo de Amikoj, populare nomataj Kvakeroj“, kiel anoncas la titolo. La kajero bone plenumas tiun ĉi anoncon; koncize sed interese ĝi raportas bonstille pri la kvakeroj kaj la kvakerismo, kaj oni povas ĝin rekomendi al ĉiu intereso.

KARAKTERO. Laŭ Mr. J. M. van Stipriaan Lufcius, advokato en Hago. 6-a plivastigita kaj plibonigita eldono tradukita laŭ la 13-a eldono de la nederlanda originalo. Hago 1920. Akcia Societo „Centra Esperanto-Libro“. 32 p. 15 s. 18 1/2. Prezo 0,30 hl.

Jam trifoj mi legis tiun ĉi libron, kiu nun aperis en la 6-a eldono. Sed ĉiam denove mi legas ĝin kun intereso kaj aprobo. Precipe ĝisnunaj povas ĉerpi valorajn instruojn el ĝi. Bedaŭrinde la verketo ne estas tute libera de preseraroj, ekz. sur ĝi. 51: oni iru tra ili sian propran noblan fojon (anst. vojjon); sed tiu erareto tute ne malgrandigas la valoron de la libro, kiun oni povas rekomendi al ĉiu deziranta bonformi sian karakteron kaj fariĝi taŭga homo. (R-ano.)

OFICIALA ADRESARO de la 3-a frankfurta internacia foiro. 2 volumoj. Prezo 15 mk.

Du dikaj germanlingvaj volumoj po ĉ. 500 paĝoj kun aldono. Volumo 1 enhavas adresaron de la firmoj kaj stabloj, kun plano de la foirejoj. Volumo 2 enhavas adresaron de la ekspozantoj alfabeto ordigitan laŭ komercaj branĉoj. Ni ĝojs trovi en la libroj interalie Esp. firmoj.

ESPERANTA LERNOLIBRO POR RUŝOJ. De P. Medem, Kovno (Litovio). Smelug. 12. 48 p. 11 1/2 s. 17 1/2.

Antaŭ nelonge mi legis, ke en Ruslando estas manko de libroj. Se la dekreto de la Sovjeta registaro pri enkonduko de E en la rusaj lernejoj ne estas nura frazo, oni devas supzi, ke ĉefe E-lernolibroj mankas. Tio okazas la nova lernolibro de P. Medem aperis ĝustatempe por forigi tiun ĉi mankon. La libro enhavas 88-paraĝrafan gramatikon, vortaron kaj ekzercon kun aldono de kelkaj poemoj kaj aliaj tekstoj. Papero kaj prezo estas tre bonaj, la kovrilu ruĝ-kolora. Oni rajtas esperi, ke la nova lernolibro havos grandan sukceson en la vasta sovjeta respubliko kaj ke post la repaĉo ni povos interilati ne sole kun la malnovaj, sed ankaŭ kun multaj novaj rusaj samideanoj. (R-ano.)

MANIFESTO de la Defenda Ligo por la teritoria unueco de Hungarlando al la E-istoj de la mondo.

Emocia artikolo pri la misera situacio de Hungarlando. La E-istoj ĉiulandaj estas petataj traduki kaj presigi ĝin en naciaj ĵurnaloj. Bedaŭrinde la germanoj ne povas tute konsenti al la artikolo; estas dezirinde, se estonte oni forigus la koncernajn frazojn.

4^a Internacia Foiro de Frankfurt a. M.



(Printempa Foiro)

10—16 Aprilo 1921



Prospektoj en germana, franca, angla, itala, hispana, holanda, danonorvega, sveda kaj esperanta lingvoj. * Petu tuj detalojn en Esperanto de

Messamt Frankfurt a. Main (Germ.)

Esperanto-Fako.

Importado ... Eksportado

H. Bidaux

Esperantista Fermo.

Speciala Fako en:

NUTRAJ PRODUKTOJ — LIKVIOROJ
VAKSKANDELOJ — PARFLUMARO
FABRIKITAJ PRODUKTOJ.

Petu liston kaj prezon al S-ro
H. Bidaux, 5 Place d'Aligre, Paris 12-e.

SILK-BRODAJON

REKTE EL ĤINUJO

mi sendas per rekomendita sendaĵo. Belega manfarita. Skribu, kion vi satas:

1. Esperanto-brodaĵo montras surskribon „Esperanto, Lingvo Internacia“, la verdan stelon kaj la tuimondon, 2. floroj, 3. birdo, 4. besto, 5. vidaĵo, 6. arbo.

15 : 20, 20 : 30 cm 25 respekt. 45 resp.-kup. afrankite. — Sendu 1 resp.-kup. por specimeno. Skribu en Esp. al s-ro

C. S. Gee, Chotsarloon, Mokadee, Hai-Yen (via Shanghai), Ĥinujo.

Abel-Kulturo.

Interŝanĝadon de artikoloj pri abelkulturo deziras

Arthur R. Fairbairn

21, St. Marys Terrace, Ryton-on-Tyne (Anglio).

Anoncetoj.

FIANĈIGIS Ilonoj Mihalsky kaj Jenő Szabó. Budapeŝt. Oktobro 1920. Kore gratulas „Sennomulo“.

AĈETO. La redakcio de ET deziras aĉeti: Histoire de la langue universelle, de Couatrat et Leau; Historio kaj Teorio de Ido; Teknikan Vortaron.

AĈETO. Esperantian rimaron mi deziras tuj aĉeti. Bonvolu sendi ofertojn kun prezo al s-ro Leono Funken, Florinsmarkt 7a. Koblenz (Germ.)

AFIŝOJN, propagandilojn kun tekstoj en aŭ pri Esp. petas, kolektas kaj interŝanĝas Hungara Esp. Servo, Budapeŝt VI, Hajos-utca 15-II-2.

„ESPERANTO“ n-ro 6 de 1919 serĉata. Mi petas ĝin de s-ano, kiu ne bezonas ĝin. Reciproka sendo laŭ elekto. Pauilo Balkanyi, Budapeŝt VI, Hajos-u. 15-II-2.

GAZET-SCIIGOJN por pravi la disvastiĝon de Esp! Sendu konstante ĉiujn sciigojn pri interesaj novaĵoj sociel, kulturaj, sciencal, komercal de via regiono per poŝtarko por la budapeŝtaj ĵurnaloj al Hungara Esp. Servo, Budapeŝt VI, Hajos-utca 15-II-2.

KOMERCISTO el ĉiuj landoj, kiuj deziras aĉeti francajn komercaĵojn kaj produktaĵojn, turnu vin al s-ro Maurice Ladrière, 6, rue Auguste Chabrières, Paris 15-e (Franc.)

KORESPONDO. Korespondadon kun anoj de ĉiuj landoj deziras la membroj de „Junula Societo“, loka grupo de GEA, Stendal (Germ.). Adr.: K. H. Wernicke, Priesterstr. 4.

KORESPONDO. Lingvo-insultisto Arno Lange, Werdau (Sa., Germ.). Crimmitschauerstr. 14, deziras interŝanĝi pm. kaj li. pk. kun eksterlandanoj kaj gesamideanoj en okupitaj teritorioj kaj respondos ĉiam.

KORESPONDO. F-ino Kato Farkas, Deak Ferencstr. 21-III-15, Budapeŝt, lernantino, deziras korespondi per pl pri literaturo ktp.

KORESPONDO. Jozefo Major, IX. Remete str. 56-II-4, deziras korespondi kun anglaj kaj sudamerikaj ges-anoj pri literaturo, verkado ktp.

KORESPONDO. Giovanni Saggioli, del. UEA en Padova (Italio), via S. Eufemia 4a, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj pri senfadena telegrafado, kaj rilata literaturo kaj gazetaro.

KORESPONDO. Luigi Puppo, via del Bragone, 1—3, Genova-Sturla (Italio) deziras korespondi kun ĉiuj per l. kaj cet. Li ĉiam respondos.

KORESPONDO. Samideano deziras korespondadon kun alilanduloj. A. Mausfeld, Hagen i. W. (Germ.), Arndtstr. 49.

PAC-AMIKOJ! Kontraŭ unu respond-kuponon mi sendos al vi Manifeston de nederlandaj kontraŭimilitaristoj. — G. P. de Bruin, Alleeweg 9, Enschede, Nederlanda.

POR „ESPERANTO“ n-ro 224 (IV/19) mi donas n-rojn 1—9 de „Nova Tempo“ al ion alitan. Prop. al Muthschall, Halle a. S. (Germ.), Anhalterstr. 10.

ŜAKO. Luigi Puppo, via del Bragone, 1—3, Genova-Sturla (Italio) volante sin perfektigi en la ŝakludo deziras fari ludojn kun gesamideanoj per korespondado (L. k. c.).

Germana

Esperanta Komerca Korporacio
Berlin-Steglitz.

Rekomendinda kiel la
plej bona
Kristnaska donaco:

Esperanto-Parfumo

gr. botelo 30 mk.
malgranda botelo 6 mk.
— Antaŭpago. —

Mendu tuj la mondparfumon „Esperanto“!

Esperanta Finnlando

Aperas 24-paĝe regule la 18-an de ĉiu monato kun interesa, bonstila, ilustrata enhavo.

Redakta ekskluzive en Esperanto.

Eldonata de

Eldona Akcia Societo „Otava“
Adr.: Uudenmaank. 10, Helsinki (Finnlando).

Librejo Rob. Piennigwerth Hirschfelde i. Sa. (Germ.)

rekomendas sin por liverado de libroj ĉiuspecaj (ankaŭ Esperantaj), artaj bildpoŝtkartoj, kaj ĉiu alia artikolo bezonata en kontoro.

— Abonantoj de ET ĝuas preferan prezon. —